# ĈEA-Retkomunikoj 2014/01

ĈEA-Retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

**ENHAVO:**

1.VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO
2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO
3. PROF. TONKIN KAJ ESPERANTO EN UNIO DE ĈEĤAJ INTERPRETISTOJ KAJ TRADUKISTOJ
4. INVITO AL LA PLEJ PROKSIMAJ ARANĜOJ
5. NOVA EKSPOZICIO "ESPERANTO KAJ KOLEKTADO" EN ESPERANTO-MUZEO SVITAVY PREPARATAS!
6. MALLONGAJ AKTUALAĴOJ
7. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ
8. MULTMEDIAJ INTERESAĴOJ
9. LISTO DE ARANĜOJ

## 1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Jen la unua numero de ĈEA-Retkomunikoj en la jaro 2014. Post iom stranga vintro venas printempo kaj kun ĝi ankaŭ nova numero de ĈEA-Retkomunikoj. En ĝi vi trovos kiel kutime multajn interesajn informojn. Por tiuj, kiuj ne partoprenis en februaro prelegon de Humphrey Tonkin kaj la bapton de la libro „Maskerado ĉirkaŭ la morto“, ni preparis mallongan raportaĵon pri tiu ĉi aranĝo…


Redaktoro Miroslav Hruška

Krome, tiu ĉi numero havas du novaĵojn.

**Unue**, ni preparis por vi novan stilon de la rubriko "AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ", kiu enhavas en la PDF-versio ankaŭ bildon kaj enkondukan tekston...pro tio ni devis ŝanĝi ankaŭ aspekton de tiu ĉi rubriko, do mi esperas, ke vi ŝatos ĝin...

**Due**, la unuan fojon estis PDF-versio de ĈEA-Retkomunikoj preparita en programo Scribus, kiu ofertas pli komfortan laboron kun tekstoj kaj kun bildoj...Mi, kiel ĉefredaktoro, uzis tiun ĉi programon la unuan fojon en mia vivo, sed tuj ekŝatis ĝin kaj do mi antaŭvidas, ke de nun la PDF-versio estos kreata nur en tiu ĉi programo.

Do, agrablan legadon!

PS: Ŝparu la naturon - se eblas - ne printu tiun ĉi numeron de ĈEA-Retkomunikoj, se ne nepre necesas. Estu amiko de la naturo!

## 2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO

Kiel tradicie, ankaŭ tiu ĉi numero de ĈEA-Retkomunikoj en PDF-formato elŝuteblas ĉi tie.


Arkivo de Retkomunikoj troveblas ĉi tie.

## 3. PROF. TONKIN KAJ ESPERANTO EN UNIO DE ĈEĤAJ INTERPRETISTOJ KAJ TRADUKISTOJ

La 10-an de februaro okazis en la salono de la Unio de interpretistoj kaj tradukistoj (JTP) en Prago bapto de la libro fare de **Tivadar Soros** *"Maškaráda kolem smrti. Neuvěřitelný příběh o tom, jak autor vyzrál nad gestapem"* (Maskerado ĉirkaŭ la morto. Nekredebla historieto pri tio, kiel la aŭtoro superruzis gestapon). Temas pri rememoroj de la aŭtoro pri la dekmonata holokaŭsto en Hungario. El la Esperanto-originalo ĝin tradukis Jindřiška Drahotová. Por tiu okazo venis en Pragon Humphrey Tonkin, la editoro de la verko kaj tradukinto anglen, eksprezidanto de UEA kaj profesoro pri humanistiko en la Hartford-universitato. Antaŭ la bapto, kiun ĉeestis pluraj esperantistoj, H. Tonkin prelegis pri la malfacilaĵoj de tradukoj de memuaroj sur la ekzemplo de la traduko de Maskerado el Esperanto.

Ĉar ĝi celis anglistojn, li parolis en la angla sen interpretado. Dum la bapto li jam parolis en la origina verko de la libro, do Esperanto, kun la interpretado ĉeĥen. Parolantoj de la angla povas konatiĝi kun lia prelego ĉe la paĝaro de JTP. Se ni sukcesos havigi ĝian tradukon en Esperanton kaj en la ĉeĥan, ili estos lokitaj ankaŭ al www.esperanto.cz. Pli da informoj pri la evento kun pluraj fotoj vi povos trovi en Starto.

Prezo de la vere leginda libro estas 297,-CZK kaj aĉeteblas en normalaj libroservoj aŭ ĉe la eldonisto Petr Chrdle (www.kava-pech.cz)



**Humphrey Tonkin dum la prelego**



**Jindřiška Drahotová kaj Humphrey Tonkin**

# 4. INVITO AL LA PLEJ PROKSIMAJ ARANĜOJ

## 4.1 REGIONA RENKONTIĜO EN LITOMYŠL - 26.4.2014

Ĉi-foje oni admiros ne nur historiajn belaĵojn de la urbo. Planatas interesa fakekskurso al nove malfermita maŝinindustria kaj al la plej nova urba memorindaĵo, tn. Nova preĝejo de la Eklezio de Bohemaj fratoj, konstruita en 2008–2010. Detalan programon petu ĉe svitavy@esperanto.cz.



**Nova preĝejo en Litomyšl**

## 4.2 LINGVA SEMINARIO KAJ SABLA PRINTEMPO EN SKOKOVY (BOHEMIA PARADIZO) - 12/13-18.5.2014



Jen optimuma okazo kiel kunligi lingvoperfektiĝon, interretan kleriĝon, ekksursojn al belega ĉirkaŭaĵo kaj vesperan amuziĝon en amika etoso en familieca pensiono ESPERO (**http://www.penzionespero.estranky.cz/**), krome sub aparte favoraj financaj kondiĉoj! Disponeblos 2 konversaciaj grupoj por pli aŭ malpli progresintoj kaj por interresitoj individua instruado de komputila voĉregistrado en la progamo Audacity.

Pliajn detalojn vidu en **Kalendaro de aranĝoj** kaj en **Fotogalerio**. Eksterlandaj gastoj aparte bonvenas!

Pri pluaj printempaj aranĝoj informiĝu en Kalendaro de aranĝoj fine de tiu ĉi numero de Retkomunikoj.

# 5. NOVA EKSPOZICIO "ESPERANTO KAJ KOLEKTADO" EN ESPERANTO-MUZEO SVITAVY PREPARATAS!



Sabate la 27-an de septembro 2014 (kadre de la tutŝtata filetala ekspozicio) okazos ankaŭ inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio kun la supre menciita temo. Por ke ĝi estu laŭeble plej kvalita kaj bunta, kunlaboro de kolektantoj estas certe bezonata!

Ni serĉas interesiĝantojn, kiuj pretus senpage disponigi por unu jaro elekton el siaj kolektoj. Bona pritrakto kaj protekto kontraŭ damaĝo aŭ ŝtelo estos prizorgita. Nomoj (kaj laŭ interkonsento fotoportretoj) de la ekspoziciantoj estos videble menciitaj. ĈEA pretas repagi sendokostojn de la pruntedonantoj kaj siakoste ankaŭ bonorde resendi la materialojn post fino de la ekspozicio.

Ni serĉas ekspoziciaĵojn en du kategorioj:

**1)** "Esperantaĵoj" (prioritate filatelaĵoj: poŝtmarkoj kaj kovertoj, kaj tridimensiaj objektoj (suveniroj kun Esperanto-motivoj, kuriozaĵoj) sed ankaŭ insignoj, glumarkoj, medaloj, kalendaroj ktp (ne tiom bildkartoj, krom historiaj ĝis 1939).

**2)** "Kion kolektas esperantistoj" - specimenoj el diverstemaj kolektaĵoj pri NEesperantaj temoj: ekz. moneroj kaj bankbiletoj, artaĵoj, popolmetiaj objektoj, folkloraj pupoj, ludiloj ĝenerale k.t.p.

**3)** "Kuriozaj suveniroj el eksterlando"

Bv. sendi vian ĝeneralan oferton al la adreso **muzeagrupo@esperanto.cz** (kun priskribo kaj laŭeble fotaĵoj de la ekspoziciaĵoj). Nur post konkreta interkonsento bv. sendi la elektitajn objektojn. Alikaze ĈEA ne garantias kovron de sendokostoj aŭ ekspoziciigon. Eblas kompreneble ankaŭ persona transdono en Svitavy (aŭ dum Regiona renkontiĝo en Litomyšl). Dankon por via komprenemo, ni antaŭdankas vian intereson, kaj antaŭĝojas pri la kunlaboro!

# 6. MALLONGAJ AKTUALAĴOJ

## 6.1 ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO HAVAS NOVAN ESTRARON

Dum semajnfino inter la 7-a kaj 9-a de marto 2014 okazis la unua komuna renkontiĝo de Ĉeĥa, Slovaka kaj Pola Esperanto-junularo en Svitavy en Ĉeĥio. Sabate matene okazis ĝenerala asembleo de Ĉeĥa Esperanto-junularo, dum kiu oni elektis novan komitaton kaj revidan komision.

Nova estraro estas jena:

**Komitato:** Vít Guglielmo Mišurec (prezidanto de ĈEJ), Jan Šebetovský (vicprezidanto de ĈEJ) kaj Romualda Jeziorowska

**Revizia komisiono:** Daniel Mrázek (prezidanto de revizia komisiono), Miroslav Hruška, Václav Zouzalík

Pli da detaloj pri la renkontiĝo vi povas tralegi **en jena raportaĵo**.

## 6.2 NOVA INTERRETA PROJEKTO KUN ESPERANTO NOMO

La 13-an de marto 2014 estis lanĉita nova interreta projekto, per kiu oni povas aĉeti biletojn ne nur por Ĉeĥaj fervojoj, sed samtempe ankaŭ por konkurencaj kompanioj RegioJet kaj LEO Express. La aŭtoroj de tiu ĉi projekto elektis esperantan nomon por ĝi - "Bileto". Laŭ unu kunlaboranto sur tiu ĉi projekto origine ne estis plano ligi al esperanto, sed la nomo estis elektita pli malpli hazarde kun tio, ke la teamo sciis, ke ĝi estas vorto en esperanto...

Nuntempe la paĝo ankoraŭ ne estas tute preta, ĝi funkcias nur en beta versio, sed ĉiukaze oni jam povas viziti la paĝon **www.bileto.cz**. Nuntempe vi ja devas por uzado de tiu ĉi paĝo ensaluti per Facebook.

# 7. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ




Ni invitas vin al regulaj vizitoj ĉe http://www.esperanto.cz/eo/aktuality kaj informas vin pri la novaj artikoloj el la lastaj semajnoj:

### Artikoloj en esperanto en www.esperanto.cz

**Filmĵurnaloj de VERDA STACIO**

Esperanta reta radio- kaj televidstacio VERDA STACIO el Ostrava venas kun la nova jaro kun projekto de FILMĴURNALOJ, informantaj pri la okazintaj interesaj Esperanto-aranĝoj.

**Reta Esperanto-Televido el Adelajdo**

Ni invitas vin viziti programojn de la interreta projekto el Aŭstralio. Enestas seriozaj prelegoj, sed ankaŭ muziko kaj amuzaĵoj. Pluraj filmoj rilatas ankaŭ al la ĉeĥa kulturo.




**Novaĵoj en Verda Stacio kaj en Esperanta Retradio**

Jen invito al interesaj aktualaĵoj en la du menciitaj gravaj retejoj.

**Nur ĉeĥlingvaj artikoloj:**

**Čeští esperantisté v rozhlase a televizi**



(Ĉeĥaj esperantistoj en radio kaj televido)

Zveme vás ke sledování nových článků a pořadů, jejichž protagonisty jsou Josef Kobza, Jaroslav Mařík a dr. Max Kašparů.

**Metodika jízdného aneb jak levně cestovat s ČD v roce 2014?**

(Kiel malmultekoste vojaĝi kun Ĉeĥaj fervojoj en jaro 2012?)

Letmým pohledem do kalendáře budoucích akcí zjistíme, že během jara se bude konat několik setkání. Mezi jedním z důvodů, proč jet či nejet ve finále, může být i cena jízdného za dopravu na akci.

**O esperantu v českém tisku**



(Pri esperanto en ĉeĥaj medioj)

V návaznosti na aktualitu z 26.1.2014 vám nabízíme k přečtení další nové články, tentokrát v odborných časopisech, novinách i internetových portálech.

**Pri pilsena biero esperantlingve**



Vojaĝante tra Ĉeĥio kaj vizitante Pilsenon, la metropolon de Okcidenta Bohemio, mondfaman precipe pro sia biero, ni rekomendas ne maltrafi i.a. tre interesan historian Bierfarejan muzeon. Tie ekde nun inter oficiale disponeblaj fremdlingvaj ĉiĉeronaj tekstoj troviĝas ankaŭ tiu en Esperanto.

**Bulletin pražského klubu v novém kabátě**




(Bulteno de la praga klubo en nova mantelo)

Kulturní časopis „Bulteno“, který vydává Pražský esperantský klub, má od ledna 2014 nového redaktora, JUDr. Tomáše Břicháčka.

**Procvičování slovíček**



(Ekzercado de vortoj)

Slovní zásoba se dá procvičovat pomocí počítačových programů, které používají metodu opakování s mezerami (space repetition). Jedná se vlastně o počítačovou obdobu kartičkové metody, kdy na jedné straně je slovíčko česky a na druhé v cizím jazyce.

## 8. MULTMEDIAJ INTERESAĴOJ



### 8.1 SONREGISTRAĴOJ

Lewis Carroll - Alicio en Mirlando - La 1-a ĉapitro - Mirinda falego kun ligiloj al registraĵo de ĉiuj ĉapitroj

Ahmad Reza Mahmudi - Psikologio kaj mistikismo - interesa prelego pri proksimiĝo inter sciencoj kaj spiriteco

Mozart - Ario de Leporello el "Don Giovanni" - kantas Veselin Damjanov

John Lennon - "Imagu" - kantas Sylwia Lipka

### 8.2 VIDEOJ

Intervjuo kun Nobelpremiito kaj esperantisto prof. Reinhard Selten - esperantlingve kun samtempaj Esperanto-subtitoloj
Version kun ĉeĥaj subtitoloj vi povas spekti ĉi-tie: http://www.youtube.com/watch?v=NwdqSbQI8Zk

Poludnica 2014 - videoraporto el la novjara aranĝo en Slovakio

Esperanto en Hispanio - modela konciza prezento pri nuntempa Esperanto-agado en Hispanio, pretigita por UK en Rejkjaviko 2014

Kajto - Al Birdoj - kanto de la fama nederlanda muzikgrupo, el la albumo "Tohuvabohuo"

Kvizo pri Esperanto-kantistoj - 10 konataj Esperanto-kantoj kaj voĉoj - ĉu vi ekkonas, al kiu ili apartenas?

S.Yradier - La Paloma (Mara Kolombo) - kantas Miroslav Smyčka dum Okcidentbohemia renkontiĝo en Plzeň (15.2.2014)

Karel - Kryl - Ankro kaj kruco - omaĝe al jubileoj de liaj naskiĝo kaj forpaso kantas (en sia traduko) Vladimír Türk dum Okcidentbohemia renkontiĝo en Plzeň (15.2.2014)

Prezentiĝo de la seniora kantrigrupo dum la ĈEA-Konferenco en Nymburk

### 8.3 FOTOGALERIOJ

Fotogalerio pri Okcidentbohemia regiona renkontiĝo en Pilseno 15.3.2014

## 9. LISTO DE ARANĜOJ



2014-03-15 Okcidentbohemia regiona renkontiĝo -
Info: pisek@esperanto.cz

2014-03-22 Tabloludoj en Svitavy - Info: dvor.libuse@seznam.cz

2014-04-4/6 La 5-a BIERO en Havlíčkův Brod

2014-04-26 Regiona renkontiĝo en Litomyšl - Info: svitavy@esperanto.cz

2014-04-30/-05-04 Bibliaj Tagoj en Tuchoměřice u Prahy - Info: stefanlepping@gmx.de

2014-05-12/18 Seminario en Skokovy - Info: drahotova@esperanto.cz, tel. 720 652 320

2014-05-13/18 La 9-a Sabla Printempo en Skokovy - Info: pisek@esperanto.cz

2014-05-17 Printempa regiona renkontiĝo en Bludov - Info: kvidojanik@seznam.cz

2014-06/15 Grimpado al Granda Ĉantorio - Info: leontodo@centrum.cz

2014-06-15 La 18-a Esperanta tago en Pardubice Info: pardubice@esperanto.cz

2014-07-13/26 Dua etapo de SET Lančov

2014-07-27/08-08 Tria etapo de SET Lančov

2014-08-08/10 Renkonto de ekstendaranoj en SET Lančov  Info: let.lancov@seznam.cz

2014-09-12/14 Renkontiĝo de ĉeĥa IKUE-sekcio en Svatý Kopeček ĉe Olomouc - Info: m.svacek@seznam.cz

2014-09-20 Postferia Renkontiĝo en Strž apud Dobříš - Info: pisek@esperanto.cz

2014-09-27/28 Inaŭguro de la ekspozicio "Esperanto kaj kolektado", Tutŝtata filatela ekspozicio + Kleriga dimanĉo en Svitavy - Info: svitavy@esperanto.cz

2014-10-30/11-02 3-a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice Info: verdastacio@gmail.com

2014-10-24/26 ĈEA-Kongreso en Prostějov -  Info: cea@esperanto.cz

2014-11-13/16 Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST), info: http://kaest.ikso.net/

2014-11-29 Antaŭkristnaska Renkontiĝo en Písek - Info: pisek@esperanto.cz

2014-12-13 Marcipana Kristnasko en Svitavy Info: svitavy@esperanto.cz

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al retkomunikoj@esperanto.cz . Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

ĈEA-Retkomunikoj 2014/01
Kontakto kun ĉefredaktoro: Miroslav Hruška – retkomunikoj@esperanto.cz
Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš